

AVENO #44 - Ekologio kaj Ekonomio - 2018

2017-01 Bonan Novan Jaron ! Nova informilo **kern.info**

Jen intervjuo kun Sean O'Riain pri la nuna stato de atomarmiloj.

La intervjuo okazis enkadre de KAEST 2016 en Modra.

<https://kern.punkto.info/2016/12/21/kp103-nukleaj-armiloj-nuntempe/>

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj trovighas je la enirpagho, krome – vidu la butonojn maldekstre ...

La teksto (kutime uzante (ch ... u) estas lau la dato; bonvolu serchi temojn lau via intereso.

Ni ofte uzas de **wikipedia.org** (au eo.wikipedia.org) kaj ili ankaŭ bezonas regulan subtenon.

BIC BFSWDE33BER, IBAN DE33 1002 0500 0001 1947 00

==

2018-12-31 Tutmonda homaro troe kreskas

Nuntempe vivas 7,6 miljardoj da homoj sur nia planedo, 83 milionoj pli ol komence de 2018.

En Afriko nun vivas 1,3 miljardoj – kaj oni prognozas 2,5 ghis 2050. (lau ARD.de 2018-12-21)

Detaloj de UN Populacia Fonduso (3 lingvoj): unfpa.org/data/world-population-dashboard

Komento de AVE/mw:

Krome richaj landoj rikoltas en Afriko por siaj homoj, tial aĉetis (au longtempe luprenis) grandegajn kaj la plej bonkvalitajn areojn por agrikulturi kiujn ili regas el eksterlando. Koruptaj registaroj ne interesighas pri la sorto de siaj civitanoj. Etnaj grupoj tro ofte pensas nur pri si, kaj konkurencas kontraŭ aliaj etnoj.

Afriko estas grandega, sed grandaj areoj ne taugas por agrikulturo; krome oni devus respekti la vivo-raĵton de la indigenaj bestoj kaj biodiversecon. Naturafabla turismo permesas iomete utiligi la natur-rezervejojn, kaj donas kelkajn laborlokojn.

Simile granda problemo estas la manko da socialaj servoj kiuj permesas al familio limigi la kvanton de siaj infanoj. Krome virinoj ofte ne povas ricevi kontra-koncipilojn, se ili volas mem plani gravedecon.

--

2018-12-29 Plastajhoj – poemo – bananoj

En agrikulturo oni ofte uzas plastajn foliojn – gravas recikli au kolekti ilin.

Plastajhoj ne venu en la natur-medion, ĉar iam ili revenas al ni – ekzemple en formo de mikro-plastajhoj. Mi audis „belan poemon“ pri tio:

Rita Apel zu Mikroplastik (en la germana): www.youtube.com/watch?v=kUOTyc-ITtA

Pli pri plastajhoj en la akvaroj (en Esperanto): verduloj.org/akvo.htm

= =

2018-12-20 Denove minaco al Tutmonda Natur-heredajho Selous - alvoko al la prezidento de Tanzanio

Kara Mramba, se vi povas - bonvolu influi vian prezidenton, ke li finas la nunan planon konstrui grandegan barlagon je la Rufiji rivero, kiu detruus la Selous Parkon. Denove temas pri minaco al tiu Tutmonda Natur-Heredajho. Ĉar europaj konstru-entreprenoj retirighis de tiu projekto, kiu havus kapaciton de 2.100 MW, nun egipta firmao volas eklabori. Bedaurinde - oni jam komencas malarbarigi la terenon da 1.100 kvadrataj km.

Tiu projekto tranchus kaj tiel detruus ne nur la biosferon de elefantoj, girafoj kaj hipopotamoj, sed ankaŭ detruus la vivo-bazon de ĉ. 200.000 loĝantoj. Ekzistas ankaŭ teknikaj argumentoj kontraŭ tiu plano:

- la sedimentoj de la rivero restus malantau la barajho, sed tiuj estas la bazo de la regiona agrikulturo.

- Oni vidas je la Nilo, ke la delto reduktighas kaj sala marakvo eniras la grundakvan tavolon.

- eble la akvokvanto reduktighos kaj pro klimata shanghigho kaj pro plia uzado de agrikulturo je la pli supraj regionoj; tiam la repago de la konstruajho estus malfacila.

Jen informoj en la angla:

https://wwf.panda.org/wwf_news/press_releases/?330134/Tanzania-announces-key-assessment-for-Selous-World-Heritage-site

Por produkti energion ekzistas aliaj eblecoj (suno, vento, biogaso).

2018-12 Fosforo – eble la estonta „botelkolo“

Chiu organismo bezonas P (fosforon) en formo de fosfato (ADP kaj ATP).

Ghis nun oni konas nur malmultajn lokojn kie ghi estas abunda por ekspluati;

sed chiam ni dissipas ghin – forfluigante ghin el niaj necesejoj al la maro, au al deponejo.

Do, necesas re-teni P en la biologian cirkuladon de la agrikulturo kaj nutrado.

(Informo lau detala artikolo en la germana de Kerstin Hoppenhaus, Die Zeit, 2018-11-22, p. 34-35)

--

2018-12-11 Klimatovarmigho – la 4 plej varmaj jaroj

Tutmonde oni spertis pli altajn temperaturojn kompare kun la jaroj antaŭ 2015.

Temas pri regionaj gravaj sekecoj – kaj inundoj, uraganoj, pli grandarea degelo de glacio je la polusaj regionoj.

Ech gigantaj firmaoj rimarkas tion: varo-shipoj ne plu atingis la fabrikojn, char la nivelo de la Rejno dum 3 monatoj malaltighis (che BASF en Germanio).

Pli je: eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Organizaĵo_pri_Meteorologio

La retejo de WMO en la UN-lingvoj: wmo.int

Kaj la Internacia Tutmonda Oficejo prj Klimata Shanghigho (IPCC) admonas fari chion, ke la plialtigo de la tutmonda temperaturo ne igu pli ol 1,5 gradoj. Retejo en 6 lingvoj: ipcc.ch

--

2018-12-11 JEFTA-traktato kontrauas daurigeblon:

La verda EP-ano Sven Giegold, kritikis la ratifon de la JEFTA-traktato inter Europa Unio kaj Japanio.

Li ne entute kritikis ke oni interkonsentas pri malfermaj merkatoj, sed kritikis (ekzemple):

- ke socialaj kaj ekologiaj normoj ne ludas gravan rolon, kaj oni ne rajtas postuli ilin en ofertoj;

- ke favori klimato-protektajn celojn (lau COP-o de Parizo ekzemple) ne eblas postuli;

- ke oni ne zorgis por protekti praarbarojn, char Japanio importas multe da arbo-trunkoj;

- ke ghi favoras privatajn akvo-provizajn konzernojn.

Lau lia retejo en germana la angla lingvo: sven-giegold.de/jefta-wasser/

= =

2018-11-28 Bulgario – shose-plano kiu detruos trezoron – bonvolu kun-agi:

La ravino de rivero Kresna estas naturprotektata tereno, kie vivas pluraj endangherigataj specioj. Ghi trovighas en la en okcidenta Bulgario (de la Vitosha-montaro (sude de Sofio), ghis la maro en Grekio). La registaro volas tranchi ghin per autoshoseo. Ekzistas – ech pli bona - alternativa vojo.

Bonvolu kun-agadi kaj sendi mesaghon (jam pretan – au modifeblan) al la prezidento kaj al la EU-Komisaro pri natura medio. (en la retejo estas elektebla 6 lingvoj)

<https://act.wemove.eu/campaigns/sauvons-les-gorges-de-Kresna>

--

2018-11-12 alternativa necesejo

Bill Gates, usona miliardulo kaj filantropo, diskonigis en Pekino ĵus inventitan “novepokan necesejon”, kiu ne bezonas akvon nek ligan al kloaka kanalo, nur kemiaĵon por transformi fekojn en sterkon. Gates diris, ke tradicia necesejo forpelas ekskrementon per akvo. Tamen tiu nova necesejo ne ligiĝas al ajna kanalo. Ĝi uzas kemiaĵon por trakti pisaĵon kaj fekon.

Kiel unu el la kreintoj de Mikrosofto, Gates ĉeestis la importan ekspozicion en Ŝanhajo antaŭ unu tago, kaj estas unu el la gravaj gastoj de la ekspozicio. Li aplaudis tutmondiĝon kaj la liberan komercan sistemon, kiuj realigis la “novepokan necesejon”.

La ekspozicio prezentas 20 purigilojn kun alta teknologio, kiuj celas forigi danĝerajn bakteriojn kaj eviti malsanojn. Opinions Bill Gates, ke tia “novepoka necesejo”, kiu kunigis multajn novigajn teknologiojn, fariĝos ŝlosilo por estonta neceseja revolucio. Espereble ĝi ankaŭ promocios la "necesejan revolucion" en Ĉinio.

Lau: http://esperanto.china.org.cn/2018-11/12/content_71884236.htm

Vidu ankaŭ che vikipedio pri tiaj ekologiaj necesejoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Kompo%C5%9Dtiga_necesejo

--

2018-11-03 Sunprotekta ŝmirajho por nia hauto minacas koralojn !

La pacifika ŝtato Palu malpermesis kelkajn el tiaj protektenzoj, se ili enhavas Oxybenzon au Octinoxat, kiuj helpas al la hauto char ili adsorbas la danĝerajn radiojn UV-A kaj -B. Bedaurinde ambau substancoj efikas kiel kseno-hormonoj (do, fremdaj al normalaj organismoj hormonoj), kaj tial minacas al koraloj.

Lau de.Wikipedio.org Hawajo (Usono) malpermesos Oxybenzon ekde 2021.

Tiaj substancoj troviĝas en la listo de la Europa Agentejo pri Kemiaĵoj, ECHA, kiu traktas ankaŭ la taksado REACH.

(lau Badische-Zeitung.de, 2018-11-03, p. 11)

Komento de AVE/mw:

Ni scias ke ankaŭ la klimata shanghigho kaj acidigo de la mar-akvo - pro pli alta CO₂ - minacas la koralo-rifojn.

--

2018-11-22 Komentoj pri la nova prezidento de Brazilo:

Lucas el Brazilo dankas por nia solidareco kaj esperas:

„Niaj demokratiaj intuicioj ne estas fortaj, do mi ne scias cxu ili rezistos bone...

Tamen, multaj bonaj personoj ankoraŭ logxas cxi tie kaj ni luktos per la solidareco.“

Haro el S.A.:

„Sxajne malbona rezulto ankaŭ por la amazona pra-arbo, kaj aliaj biotopoj... Mi ne povas kompreni kiel, en la nomo de kristana Dio, politikisto povas samtempe minaci forton al politikaj malamikoj. ... “

Kaj multan dankon pro la faktoj pri olivarboj!

= =

2018-10-31 raporto pri minacata vivantaro

WWF prezentis raporton pri la redukto de multaj sovaghaj bestoj, birdoj, insektoj k.s. - mi ne legis pri plantoj.

Multaj eko-sistemoj kaj viv-bezonataj terenoj estas trouzataj au poluataj de ni homoj. Stratoj tranĉas la viv-sistemojn. Riveroj estas barataj kaj kanaligataj. Kampoj uzataj por monokulturoj. Ktp.

Pli: wwf.org

--

2018-11-16 TILT – pagi por CO₂ - la nova informejo por la Verda Movado

Verdaj = pri ekologio, sociala justeco, homaj kaj bestaj rajtoj, konflikt-solvo pere de rondaj taboloj

Jen peticio organizita de Tilt:

Post la nuna informo de IPCC (tutmondaj sciencistoj pri la klimata shanghigho) ke jam +1° estas atingita kaj ke 1,5° estas la limo por ne tro gheni la klimaton, la Verdaj Partioj postulas enkonduki en EU komunan prezon por eligi CO₂. (mi esperas ke por en- kaj el-spiri ni ankoraŭ ne devas pagi).

Bedaurinde la EU-Komisiono kaj pluraj politikistoj ne volas doni prezon al CO₂.

Tilt petas subteni tiun postulon: https://www.tilt.green/carbon_price

Tilt publikas la artikolon ankaŭ en diversajn lingvojn – teorie eblas ankaŭ en Esperanto (se „ni“ tradukas); niaj francaj geamikoj, jam pripensas pri tio.

= =

2018-10-11 Olivarboj povas defendi sin mem se ili estas en bona socio

En Apulio (suda Italio) antaŭ 5 jaroj invadis (el Costa Rica) bakterio (Xylella fastidiosa), kiu vivas de oliv-arboj, reduktas la rikolton kaj eĉ povas mort-sekigi la olivujojn.

La bakterio estas transportata de cikada specio. La ministerio ordonis forhaki en ĉirkauaĵo la arbojn kaj ŝpruci pesticido(j)n en la regiono kontraŭ la cikado.

Feliche ne ĉiuj blinde faras kion iu ordonas. Ekologiema oliv-bienulo remeroris al praaj tempoj. Tie kreskis multaj herboj en la oliv-kultura kampo, fakte estis biotopo kun biocenozo. Tio signifas ke iliaj radikoj ankaŭ nutris la olivujojn, kaj ekstraktis mineralojn el la grundo. Krome li aldonis mankantajn (pro la eterna monokulturo) mineralojn. Nun liaj oliv-arboj estas suficite sanaj por elteni la agadon de tiu bakterio.

La moderna agrikultura sistemo kiu uzas glifosat por elimini la herbojn (konkurantoj kiuj ja ankaŭ bezonas ion por vivi), detruis tiun reton da komuna interhelpo (de la herboj, arboj kaj vivantajho en la grundo).

Do, bona ekzemplo kiamaniere sagha konduto – favore al la tuteco - estas pli favora ol undirekta kiu nur vidas la propran profiton. (lau Bad. Ztg. 2018-10-11, p.3 – tie ankaŭ bona artikolo pri agrikulturo en Simbabwe)

= =

2018-10-02 Rearbarigo - Alternativa Nobel-Premio- Right Livelihood Award (de Jakob von Uexkuell)

jen amendo de la antaŭa informo:

Ekologio: Toni Rinaudo (Australio) & Yacouba Sawadogo (Burkina Faso)

ek-uzo de FMNR (kampane mastrumata natura regenerado de arboj) en la sekaj regionoj de Afriko; tiamaniere ebligas rearbarigo el la restantaj radikoj (post faligo de arboj) en la Sahel-zono.

Jen pli detala artikolo – kun pli detalaj ligoj: eo.wikipedia.org/wiki/Yacouba_Sawadogo

(dankon al Herman Deceuninck)

= =

2018-09-13 Gango – plej poluata rivero - ghenerale

laù raporto ĉe la franca televido A2, en Venarasi(Benares) sur la riverego Gango,rigardata kiel sankta por la hinduoj , la akvo estas la plej poluata en la mondo .

Estas pli kaj pli da kremacioj (bruligo de mortintoj) kaj pli kaj pli da cindroj ĵetataj en la riveron, kiu fluigas 200 milionojn da litroj ĉiutage. ne parolante pri la rubaĵoj de la milionoj da loĝantoj !

Ne ekzistas uzino por prilabori kaj purigi la akvojn .

Krome: Aldone, okaze de la eùropa tago de heredaĵoj,(15an-16an de septembro) dediĉita al industria heredaĵo, multaj urboj en Francio proponas viziton de la akvopurigejon !

(dankon al Renee Triolle)

--

2018-09-01 Francio malpermesas subchielan uzadon de abelo-mortigaj insekticidoj

EU malpermesis je fino de Aprilo la sub-chielan uzadon de 3 neonikotinoj (neonicotinoj):

Imidacloprid, Clothianidin kaj Thiamethoxam.

Nun Francio entute malpermesas la uzon, kaj adicie malpermesis 2 pliajn:

Thiacloprid kaj Acetamiprid.

Unuflanke temas pri la prootekto de la abeloj kiuj ja produktas mielon kaj zorgas por la fekudigo de frukto-arboj; sed ankaŭ aliaj parencoj – ekz-e burdoj estis paralizitaj (ekz-e ne plu sukcesas orientighi) de tiaj pesticidoj.

Anton Hofreiter (ĉefo de la frakcio Verduloj en la germana parlamento) postulas de la ministrino pri agrikulturo, Klöckner, sekvi la ekzemplon de Francio.

= =

2018-08-29 ĉu kanceraj chirkau Soulaines pro atom-rubajho ?

Mi komprenis el tiu franclingva informo, ke chirkau rubo-stokejo por atom-rubajho el atomcentraloj (k.a. ?) altighis la nombro da kanceraj, aparte de tiroido – kiu devenas de radioaktiva jodo.

Jen la retejo: http://www.villesurterre.eu/index.php?option=com_content&view=article&id=108

= =

2018-08-28 la franca ministro pri naturmedio, Nicolas Hulot, retirighis

Sven Giegold (frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj en la EP) komentis:

Respekton – li sukcesis iomete, sed pri kelkaj gravaj temoj li ne ricevis la subtenon de la liberala prezidento

Macron. Nek pri klimato, nek pri reduktado de pesticidoj. Teni la grundon (humon) en bona kvalito kaj enkondukti ekologiajn temojn en la ekonomion evidente ne interesigas la prezidenton.

2018-08-25 Sablo-elfosado detruas la marbordojn

antaŭ kelkaj jaroj neniu pensis ke manko da sablo povus ighi tutmonda problemo.

Tiam la detruo de la mangrov-arbaroj minacas la tropikajn mar-bordojn, ekz-e pro la akvokulturo de salikokoj.

La ekspluatado de sablo por kreado de artefaritaj insuloj kaj betonaj konstruaĵoj postulas ĉiam pli da sablo.

<https://www.deutschlandfunk.de/gesichter-europas.921.de.html>

--

2018-08-24 Plastajhoj en la riveroj kaj maroj

Granda kvanto da plastaj rubaĵoj flosas en la bela golfeto Alon en Vjetnamio

Bonvolemuloj kolektas botelojn ,plastajn aŭ metalajn , sakojn plenajn je rubaĵoj ks .

La registaro esploras kion fari : limigi la nombron da turistoj ? (sed necesas por la ekonomio)

(dankon al Renee Triolle)

Simile ankaŭ en Rio de Janeiro estas la sama problemo.

Tio estus organizebla "surloke":

- informi homojn (civitanojn)

- organizi rubo-kolektadon de la ŝipoj (turismo)

Sed alia problemo estas la grandegaj kvazau-insuloj da plastajoj en la grandaj kirlaj regionoj de la tutmonda maro. Tie videblas grandaj pecoj kiuj kelfoje chirkauumas la korpojn de maraj bestoj, sed okule ne videblas la mikroplastajhoj kiuj naghas en dikaj nubformaj tavoloj, kaj poste re-venas per la fishoj al niaj tabloj.

La plastajhoj ankaŭ povas adsorbi kemiajhojn.

Tute alia granda problemo estas la restajhoj de medikamentoj kiuj ricevas homoj kaj brut-bestoj. Ili ofte havas hormon-similan efikon, ekz-e shanghas la sekson kaj konduton de fishoj.

Tio necesas tutmonda antau-zorgo (preventemo).

Jen pluraj prezentadoj: verduloj.org/akvo.htm

= =

2018-08-01 Tutmonda klimato plivarmighadas

La usona oficejo pri klimato NOAA prezentis la raporton de internaciaj kunlaborantoj pri 2017.

2014-2017 estis la 4 plej varmaj jaroj entute (ek de la 19-a jc.), 2017 plej varma sen efiko de El Ninjo!

La glacio-areo chirkau la norda poluso reduktighis je kvarono (rilate longjara averagho) kaj estas malpli dika. La mara nivelo estis 7,7 cm pli alta ol en 1993.

La kvanto da forcejaj gasoj (CO₂, CH₄, N₂O) altighis je 40% kompare kun 1990.

Jen 18 paghoj kun diagramoj (en la angla):

www.ametsoc.net/sotc2017/sotc_media_call_slides.pdf

kaj jen la enkonduko al la raporto:

www.ametsoc.org/ams/index.cfm/publications/bulletin-of-the-american-meteorological-society-bams/state-of-the-climate/

Komento AVE/mw: la homaro devas redukti sian konsumon kaj shanghi la agadon.

Unue estas la konsumo flanke de la richuloj (transportado, mallongtempaj varoj, nutrajhoj el fremdaj landoj).

Krome la kreskanta populacio en kelkaj landoj akriros la situacion, ech se tiuj vivas mizere.

- -

2018-08-03 Chu Bialowieza estas savita ?

Intertempe – eble ankaŭ dank' al la internacia peticio de 193.329 subskribintoj – la jughkortumo de EU malpermesis la arbo-faligadon en Bialowieza Nacia Parko.

La nova pola ministro pri naturmedio Henryk Kowalczyk konfirmis la finon de arbofaligado, kaj elmeto de la pezaj faligo-mashinoj el la arbaro. Tamen la medio-protektantoj restas atentemaj.

Gheneralaj informoj trovighas en Vikipedio:

de.wikipedia.org/wiki/Bia%C5%82owie%C5%BCa-Nationalpark

Plej aktuale estas artikolo en la germana semajna gazeto „Die Zeit“

www.zeit.de/wissen/umwelt/2018-04/polen-abholzung-in-urwald-verstoest-gegen-eu-recht

2017-07-02 **urgha peticio: Krakovo & Bielowieza Praarbaro**

Eble vi jam audis pri tiu granda praarbaro sur la lim-regiono de Belorusio kaj Pollando, elstara natur-trezoro en tuta Europo. Sur la pola flanko komencis nuntempe – en somero !! - ligno-falisto kun siaj grandaj arbo-voraj mashinoj – detruj ghin (areo post areo). Tie vivas la sovaghaj bizonoj, kiuj bezonas sufiche grandan areon. Kaj dum somero oni ne rajtas faligi arbarojn (escepte eble la forst-kulturoj).

Ne imageble: evidente la naci-konservativa registaro permesis la grandskalan arbo-faligadon. Biologo Tomasz Wesolowski ege chagrenighas: „Iam kolapsas la arbaro, kaj ne plu estas regajnebla.“ (kiel praarbaro)

Je la 2-a de julio renkontighos en Krakovo la Grupo pri la „Tutmonda Heredajhoj“ de UNESKO.

Bonvolu subskribi la peticion de la CSO „por savi la pluarbarojn“.

Jen ligo al peticio, kiu intertempe finis – subskribis preskau 200.000.

regenwald.org/petitionen/1100/bialowieza-urwald-erhalten-holzfaeller-stoppen

==

2018-07 Klimataj ekstremoj por la klimata shanghigho

Inundoj – multobligataj pluvo-kvantoj je unu regiono

Degelo de permafrost-regionoj minacas la loghatajn terenojn

Degelo de altaj glacio-tavoloj (Antarkto, Grenlando) kune kun plialtigata temperaturo altigas la maran nivelon
Sekeco en aliaj regionoj

--

2018-07 postvivantaj homoj post atomeksplodoj estas 2a-klasaj homoj
Temas pri homoj kiuj post translokigo al nova regiono spertis malakcepton flanke de ne-trafitaj homoj:
„Hibakusha“ de la atom-bombitaj urboj Hiroshima & Nagasaki
Homoj en regionoj kie okazis test-eksplodoj (Semipalatinsk, Nevada, Lop Nor)
Chernobil, Fukushima, ...
Sellafield, ktp. kie troviĝas uzinoj por pritrakti uranion kaj atom-rubajhon
Proksime de atomreaktoroj estas pli alta risko malsanighi pro leukemio.
(laŭ IPPNW k.t.p.)

2018 Ekologiaj tekstoj en Esperanto de AVE en retpaĝoj de germanaj NRO-oj (SCO-oj)
Jen kelkaj ret-ligoj:

Pri Euratom:

<https://www.hans-josef-fell.de/content/index.php/dokumente/documents-in-foreign-languages/esperanto>

Pri BUND (regiona asocio de naturamikoj en Germanio)

<http://www.bund-rvso.de/downloads/esperanto.pdf>

De ECOTRINOVA - Pri ekzemploj uzi la energion de la suno:

http://ecotrinoва.de/downloads/2016/151000%20Esperanto%20Energio_Freiburg_Alsaco-1.pdf

De la tutmondaj Verdaj (ekologiaj) partioj – ekz-e la Charto de 2012 (Dakar):

https://www.globalgreens.org/sites/globalgreens.org/files/GG_charter_2012_esperanto.pdf

EWS-Schoenau (la unua en Germanio civitana energi-proviza kooperativo):

116 bonaj argumentoj kontraŭ atomenergio – jen en pluraj lingvoj – i.i. ligo al tiu en Esperanto

<http://100-gute-gruende.de/index.xhtml>

===

2018-05-25 Blanka aluminio rughigas poluas teron kaj maron

La "skandalo de la rughaj shlimoj " daŭras de dekoj da jaroj . Uzino fabrikas aluminon (specialan por aviadiloj) apud Aix en Provence kaj per tubego forjhetas en la maron (apud Cassis) la restajhojn (raraj kaj dangheraj metaloj, plumbo, hidrargo, kadmio) en profundan maran fosajhon .

La maro ighis rugha, same la fiŝoj de Genova al Montpellier .

kiam kreighis la natura rezervejo (la sola en Francio surtere kaj enmare) , ni forte esperis, ke la uzino ne plu rajtos jheti malbonajhojn en la maron . La ministro pri ekologio estis kontraŭ, la chefministro jesis , kun kutima ŝantagha argumento : se ni fermas la uzinon, malaperos 750 laborpostenoj . Ni daŭre batalas , kaj nun iras al la maro nur senkolora likvajho , daŭre kun la dangheraj metaloj , kaj la rugha polvo estas jhetita en valon (evidente kiam ventas, la polvo forflugas kaj rughigas terasojn, sekighantan tolajhon ktp .

Esperanto-La Ciotat estis inter la motoroj de la batalo, unu esperantistino(regiona deputito, Verdulo) estas en la kontrolkomisiono (sed ili ne rajtas eniri la fabrikon !) .

Ni simple timas, ke se ni daŭre batalas, la uzino translokighos al Afriko kie la leghoj estas malpli rigoraj .
(de Renée Triolle, i.a. laŭ laprovence.com de 2018-05-16)

Komento: AVE/mw: Jen EU-vasta sistemo uzi kaj protekti la mediteraneon: www.perseus-net.eu/site/content.php

En Germanio okazis simile kiam firmo poluis la nordan maron antaŭ Germanio pere de rubo kiu restas je la produktado de TiO₂ (la blanka farbo). La firmao Kronos Titan transportis malkoncentritan sulfur-acidon (eble ankau kun fero en ghi) en la. Civitana protesto daŭris pluraj jarojn, ghis la malpermeso; la firmao investis kaj nun

re-gajnas la sulfuracidon. Jes, mono estas granda temo. Eviti la poluadon; kaj ne perdi la laborlokojn, tio estas defio. Jen ĝenerale: wikipedia.org/de/Verklappung/

Retejo de la firmao: www.kronostio2.com

--

2018-05-25 Ampleksa minaco pro Glyphosate / glifosato

La pilot-studo de la instituto Ramazzini en Bologna estis unu-doza studo sur Glyphosate bazitaj herbicidoj (GBHs) en ratoj, uzante akcepteblan koncentritecon da glifosato en la ĉiutaga nutraĵo (cRfD) - 1.75 mg/kg/tago, laŭ reguloj de EPA (mediprotekta agentejo de Usono). Unu-doza studo signifas ke la sama koncentreco estis alportita al la ratoj ĉiutage dum 3 monata periodo. La esploro koncentriĝis al la fazoj de la vivo de novnaskitoj, infanoj kaj adoleskoj. La rezultoj rivelas ke glifosato-bazitaj herbicidoj (GBHs) povas ŝanĝi certajn gravajn biologiajn parametrojn, plejparte rilate al seksa evoluado, genotokseco kaj la ŝanĝo de la intesta mikrobiomo (la bakterioj, ktp. kiuj troviĝas en la intesto). Pluraj institutoj kaj universitatoj en EU kaj Usono partoprenis la pilot-studon. La kostoj de 300.000 EUR estis financitaj de 30.000 civitanoj en Italio, enkadre de la kooperativo de Ramazzini Instituto. Amaso-financa kampanjo estas lanĉita por subteni longatempan ampleksan tutmondan studon pri glifosato, kiu post ĉi tiuj rezultoj nun estas urĝe bezonata.

Retligoj: glyphosatestudy.org kaj sven-giegold.de

(2018-05-25 Sven Giegold, membro de la Europa Parlamento, Frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj)

2018-05-25 100%a regajnebla energio eblas

Studo montras ke eblas rezigni pri fosiliaj energioj; necesas nur la politika volo.

www.energywatchgroup.org/100erneuerbare-energien-strom-weltweit. 7 landoj montras tion (en %) :

Island (100), Paraguay (100), Costa Rica (99), Norvegen (98,5), Aŭstrio (80), Brazilo (75), und Danio (69,4)

www.reneweconomy.com.au/a-100-renewable-grid-isnt-just-feasible-its-already-happening-73505/
(laŭ www.hans-josef-fell.de)

==

2018-05-10 Peticio al EU por konservi la pluarbarojn

Nia ĉiutaga konsumo havas flankon kiu minacas plurflanke. Temas pri la grandskala forhakado de arboj en la originaj pluarbaroj. Ili estas nepre necesa hejmo por pluraj indigenaj popoloj kaj ĝenerale por multaj specioj - inter ili por niaj parencoj, la grandaj simioj.

Krome temas pri la efiko al la klimato, ĉar malaperigo de pluarbaroj signifas grandskalan eligon da CO₂ .

Pluraj mondskalaj CSO-oj (civil-sociaj organizoj, ne-registarajorganizoj) peticias al la EU-Komisiono finfine agi laŭ sindeviga promeso ĝis 2020 protekti la restintajn pluarbarojn, kaj subteni rearbarigon. Tio signifus haltigi la importon aparte de palmoleo kaj sojfaboj el novaj monokulturoj, kie iam troviĝis pluarbaroj.

Bonvolu subskribi la peticion – jen la retejo en la germana lingvo, supre vi trovas la ligan al la gefrataj organizoj en pluraj lingvoj (de, en, fr, it, es) :

<https://www.regenwald.org/petitionen/1137/es-ist-hoehste-zeit-die-eu-muss-die-abholzung-der-waelder-stoppen>

Aŭ vizitu [Regenwald.org](http://www.regenwald.org) kaj serĉu „Abholzung“

2018-05-08 Foto-kanto de JoMo pri Fukushima

Kiu jam forĝesis la atomkatastrofon de Fukushima 2011-03-11 ? Post Chernobil kaj aliaj ...

Jen kanto en Esperanto, kantas JoMo – katastrofa poezio – interesas krome la fotoj de la loko;

Hana-wa sakedomo : <https://www.youtube.com/watch?v=cAMgZ5VEPyc>

Nekredeble por Japanio – aleo de sakuro-arboj florantaj – mankas promenantaj homoj ...

(dankon al Mirejo, krome al aŭtoro: AOKI Fumio, muziko: YOKOSAWA Yoshiichi)

Komento AVE/mw: por informo rigardu de.wikipedia.org – en multaj linvoj, sed ne en Esperanto.

Jen sur nia retejo pri energio vi trovos la raporton de HORI Jasuo en Esperanto:

<http://www.verduloj.org/dokument.htm#energio>

2018-05-06 Vojaghi bicikle al la alia flanko de la mondo
ekologiema paro kun 6-monata infano faros tian vojaghon. Vi povas sekvi ilin sur Esperanto-pagho:
Mi rememoras al ... <http://auraysydneyavelo.ouvaton.org/eo/bonvenu/>
(dankon al Ginette)

===

2018-04-29 Doel perdas alt-radioaktivan akvon
Doel 1 (funkcias ek de 1974) estas la plej agha de la belgaj aktivaj atomreaktoroj. Unue oni planis fermi ghin 2015; sed intertempe nur 2025. La perdo de kelkaj litroj da alt-radioaktiva akvo (de la primara akvo-ciklo) ne estas simple riparebla, char laboristoj nur dum mallonga tempo povas labori kaj riskas sian sanon pro alta radioaktiveco.

(informo (de): <https://www1.wdr.de/nachrichten/rheinland/leck-akw-doel-belgien100.html>)

2018-04-28 Balkan-riveroj – hejmoj de endangherigataj fishoj
aparte gravaj riveroj estas Neretva, Drina kaj Moracha. Se oni baras riverojn por konstrui akvo-energiocentralojn , pluraj fishoj ne plu povas travivi.

(de, en) <https://www.euronatur.org/aktuell/detail/news/neue-studie-wasserkraftausbau-bedroht-europas-fischparadies/>

kaj (de, en) www.balkanrivers.net

(dank' al Franz Alt: <http://www.sonnenseite.com/de/umwelt/> kaj <http://www.sonnenseite.com/en/environment/>)

2018-04-28 Dizel-skandalon en Germanio – teknika plibonigo eblus
Dum la lastaj 10 (?) jaroj okazis giganta fraudo de firmaoj kiuj produktas dizel-motorojn (por personoj). En Usono ili devis pagi gigantan punon kaj/au subteni la riparadon; sed ghis nun ne en Germanio. Nur shanghi la frauditan softvaron ne taugas, char ne sufiche reduktas la emision da NOx. Intertempe Prof-o Georg Wachtmeister montris ke enkonduki teknikan solvon tre bone taugas, kaj kostas nur ch. 2.000 Euro por persona automobilo. Temas pri SCR-katalizilo en kiu el ureo (AdBlue) kreighas amoniako kiun oni enmetas tuj post la motoro en la tubon de la abgaso.

(lau Deutsche Umwelt-Hilfe (de, en), serchu „Diesel“ ordigu lau dato: www.duh.de)

Komento AVE/mw:

La avantaĝo de dizelo estas, ke ghi pli efike uzas la energion de la fuelo, kompare kun benzino.

Krome eblas aldoni planto-oleon au bio-dizelon el uzitaj oleoj.

La benzin-auto povas uzi alkoholon, aparte grava en landoj kie kreskas zucker-kano.

2018-04-28 Golfo de Oman – mankas oksigeno en la akvo
La esploristoj mezuris grandskale kaj argumentis ka la plivarmigo reduktas la kapaciton de akvo enteni oksigenon. Krome kreighos (pro la aktiveco de bakterioj) pli da NOx, kiu estas pli efika on CO2 por altigi la temperaturon. (de, en) <http://www.sonnenseite.com/en/environment/growing-dead-zone-confirmed-by-underwater-robots.html>
Komento AVE/mw: en tiu konciza artikolo ne temis pri poluita akvo – eble char nur la monitorado gravis. Sed poluajho el agrikulturo, industrio au loghejoj bezonas oksigenon, kaj ekzemple kauzas t.n. mortozonojn en la Balta Maro.

Sven Giegold & Martin Häusling

28. Apr. 2018 Europo malpermesas la uzon de 3 neonikotinoidaj pesticidoj almenau por sub-chiela uzado - por protekti la abelojn kaj aliajn insektojn.

La EU-komisiono proponis tion, kaj sufiche granda majoritato (16 de 28) de EU-landaj registaroj akceptis; felice ankau la grandaj.

Tio estas granda venko de la antau-zorga pricipo, kiu apartenas al la kerno de EU, diris Sven Giegold kaj Martin Häusling (ambau MEP de la frakcio Verduloj / Regionalistoj). Ili esperas ke tio ighos normo, kiam temas pri novaj pesticidoj, au kiam oni rimarkas ke malnovaj havas malbenan efikon (kiel Glyphosat).

Komento AVE/mw: certe ankau dank' al amasa subskribo de peticioj je Change.org, kiujn lanchis la verduloj en la Europa Parlamento.

<http://www.sven-giegold.de/>

==

2018-04-06 Rusio malbone gardas la sanon de siaj civitanoj – kemia rubajho

Moskvo same kiel chiuj gigantaj metropoloj havas la problemon formeti rubajhon, ne nur la simplan de homaj loghejoj, sed pli severe tiun de kemiaj fabrikoj. Ekz-e en Jadrovo apud Volokolamsk (eble iu rememoras la faman libron pri la samnoma shoseo) situas stokejo de kemia rubajho kiu terure influas la aeron kaj sanon de a civitanoj. Se ne eblas recikli rubajhon, tiam oni devas bruligi ghin sub bone kontrolitaj kondicho, tiel ke restas nur la sendangheraj restajhoj kaj eble eta kvanto da dangheraj por kiu necesas aparta stokejo.

(lau Stefan Scholl, Badische Zeitung, 2018-04-06, p. 3;

<http://www.badische-zeitung.de/ausland-1/vom-giftmuell-umzingelt--151241263.html>)

==

2018-02 Referendumo pri BREXIT ?

Okazis manifestacioj en Britio kiuj postulis denovan referendumon pri BREXIT.

Bedaurinde la registaro rifuzas.

Komento AVE/mw: mi ne komprenas. Dum la unua referendumo (kun iomete pli ol 50%a jeso) oni ne bone sciis la sekvojn de eliro de Britio el EU. Nun oni vidas pli bone, kaj ankau ke ne nur temas pri la pozitivaj efikoj, sed ankau pri diversaj kostoj au perdoj – por GB. Nuna referendumo montrus pli klare, chu BREXIT sub tiuj kondicho ankoraŭ restas dezirinda.

2018-03-10 Dizel-fraudo ne nur kontraŭ sano, sed ankau kontraŭ publikaj financoj

Studajho – mendita de la Frakcio Verduloj/Regionalistoj - montris gigantan imposto-perdon pro la dizel-fraudo.

Pluraj auto-firmaoj vendis dizel-autojn kaj varbis pri bonega kvalito de la abgaso, lau EU-normo 5 au 6 kiu enhavus malmulte la NOx. Fakte estis nekredibla fraudo, char la softvaro manipulis la purig-instalajhon, kiu pro tio laboris nur dum la oficialaj testoj. Eblas meti pli taŭgan instalajhon, sed tio kostus mono por la firmaoj – ili preferas jheti grandan dividendon al siaj akciuloj.

Kial imposto-fraudo?

Kiu aĉetis dizel-auton kun EU-5 au EU-6 normo, pagis malpli da imposto.

Dum la jaroj 2010 – 2016 la imposto perdo en 11 EU-shtatoj sumighis al 46 miljardoj Euro.

Jen la ligo al konciza teksto en la germana: <http://bit.ly/2HnmnJP>

Kaj jen la studajho (en la angla): <http://extranet.greens-efa-service.eu/public/media/file/1/5503>

Komento AVE/mw: fakte eblas purigi la dizel-abgason sufiche bone, se oni aldonas ureo-likvajhon tuj post la motoro. Dizel-motoro estas pli efika ol benzina, i.a. pro la pli alta temperaturo. Pro tio kamionoj kutime uzas dizelon. Eblas sume eviti CO2, se oni produktas t.n. bio-dizelon ekz-e el kolzo au uzita oleo el grandaj kuirejoj. Tamen la kvanto de tiu fonto estas limigita. Palm-oleo eblas, sed tio rezultas en katastrofa forhakado de pluv-arbaroj (Indonezio, ktp.).

2018-02 Naturprotekto en Rusio

ecodefense.ru agadas por redukti la fosiliajn kaj atomajn energi-centralojn.

Sur ilia retejo estas artikolo pri la „Jaro de Ekologio 2017“ - evidente temas pri la lasta jaro.

Bert Schumann sendis mapon kie trovighas la malnova flughaveno de Nantes.

Ghi trovighas je la rando la urbo kaj parte en la loghata tereno, eble la urbo etendighis en tiu direkto ?

Kaj oni vidas ke la start-vojo direktas (au tushas) naturprotektan areon.

Mi shatus fini tiun diskuton – chefe char la decido kontraŭ NDDL jam okazis.

Pri NDDL – flughaveno: Jes, mi tute asertas kion diras Josette.

Kuragxe sxi defendas la malfelicxajn kiuj suferas . Nome de ili, mi dankas sxin.

Solange Goan

2018-02-03 Verduloj defendas la decidon aboli NDDL

Estas iom strange legi ke la konstruo de nova flughaveno en Notre Dame des Landes povus malpli malutili al la naturo ol la plilongigo de la ekzistantaj instalaĵoj. Tio signifus ke la plimulto de la organizoj por la protektado de la naturmedio konsistus el malkompetentaj homoj. La listo de tiaj organizoj kontraŭintaj la NDDL estas kvazaŭ senfina, sed mi, ĝis via lasta mesaĝo, neniam aŭdis pri ekologiistoj favorintaj la projekton. Krome, la flughavenoj de Basel-Mulhouse kaj Genevo; inter aliaj, funkcias kun signife pli da aviadila trafiko kaj kun malpli da surfaco ol vorota en NDDL.

La argumento pri demokratio estas konsiderinda, sed, post konsidero laŭ ekologia vidpunkto, malakceptebla. Unue, ni ne estas NIMBY*-istoj, Ne ĵustas ke oni konsideru nur la vidpunkton de la najbaroj de la flughaveno. Plue, la areo enprenata de la Socialista registaro kiam ili starigis la referendumon estis kalkulita ĝuste por certigi la rezulton kiun ili celis. Alia demando, ĉu oni rajtas prezenti sin kiel elstarajn batalantojn kontraŭ CO2 ellasaĵoj, kaj samtempe jesi ĉiun flughavenan projekton nome de ekonomia neceso? Ĉu fari la kontraŭon de kion oni proklamas estas demokrata afero?

Tamen eĉ pli strange sonis la argumento ke la projekto estas lasita por financi Parizan projekton. Se tia konflikto vere ekzistas ĝi verŝajne estus postlasinta almenaŭ kelkajn spurojn en la publika debato. Tio incitas mian scivolemon sed ne nuligas mian skeptikon. Amike, Michael

*) pri-sloganeca informo:

NIMBY - „not in my backyard“ - mi ne volas tion en la ĝardeno malantau mia domo.

Tute normale, ke homoj estas NIMBY-ismaj, ne shatas ian ghenon; sed aliflanke ne havas problemon ke aliloke okazu tia ghenon.

2018-01-31 EU postulas bonan trinkakvon el la kranjoj

<http://www.sven-giegold.de/2018/neue-eu-trinkwasserrichtlinie-spaeter-sieg-fuer-die-buergerinitiative/>

EU respondis al la ECI (Europa Civitana Iniciato) kaj finfine subtenas la alvenon al salubra trinkakvo el la kranjoj, postulante de la membroshtatoj zorgi por la provizo; tiel ke homoj ne devus aĉeti trinkakvon aparte. Tio krome reduktas la bezonon da plasto. Necesas zorgi ke la akvo ne enhavas mal-sanigajn kemiaĵojn au bakteriojn – super decitada lim-valoron.

(Sven Giegold, MEP, Verduloj/Regionalistoj)

2018-01 Francio – Diskuto pri nova flughaveno apud Nantes

en la lasta mesaĝo mi gratulis la Verdulojn ke ili kune kun aliaj sukcesis aboli la planon konstrui tute novan grandan fludhavenon apud Nantes.

Alvenis du gravaj komentoj – kaj mi petas la membrojn de EELV komenti:

1-e Laŭ tiu artikolo, oni rezignis pri grandioza projekto en Nantes por monsubteni pli grandiozan projekton cxirkaŭ Parizo por la olimpikaj ludoj, kiu multege kostos. Kiam Parizo bezonas monon, gxi estas prioritata kaj la regionoj devas akcepti submeton al Parizo. Finfine la rezigno pri Nantes cxefe montrus tiun maljustecon, ke cxiam Parizo dominas, koste de la regionoj. Kaj ke grandiozegaj projektoj cxiam ekzistas, sed aliloke. Fakte ne temas pri grandigo de la flughavenoj de Parizo, sed pri alia projekto, kiu nomigxas "Le Grand Paris" - "la plej granda urba projekto en Eŭropo"

Kompreneble la verduloj helpis al la forlaso de la projekto, sed la alia motivo eble ludis rolon.

(dankon al Ginette)

2-e Pri Notre Dame Des Landes (la nomo de la planita flughaveno), oni diris multe da malverajxoj, kaj decidis homoj, kiuj ne vivas surloke.

Fakte:

-La homoj, kiuj vivas surloke vocxdonis POR tiu nova flughaveno sed la Verduloj sxajne ne rekonas tiun demokratian vocxdonon. La plej multe da homoj, kiuj kontrauxis estas "Zadistoj" kiuj ne devenas de la regiono kaj volas senpage uzi la terenojn.

-Vi diras, ke la aktuala flughaveno estas "maltro uzata": Tute ne: gxi plenege funkcias kaj nun ecx oni volas longigi la aviadkurejon kiu ne plu suficxas kaj konstrui novan aerstacion cxar la aktuala farigxas tro malgranda.

-La aktuala flughaveno situas tute proksime de la lago de Grandlieue (loko de migrado de multegaj sovagxaj birdoj) kaj de zono "Natura 2000": kial la Verduloj neniam parolas pri tio???

-La aktuala flughaveno situas ankaux tute proksime de la urbo Nantes (la aviadiloj superflugas la hospitalo...) kaj precipe tute proksime de la urbeto "Saint-Aignan-de-Grandlieue", super kiu la aviadiloj flugas je 150m alte kaj, kiam la aviadkurejo estos longigita, je 100m alte: mimem provis dormi en esta urbeto cxe esperantistino sed ne sukcesis... Tiu esperantistino, antauxa instruistino, diris al mi, ke sxi neniam povis uzi la korton por siaj lernantoj cxar multe tro brua. Sximem ne povas uzi sian gxardenon. En sia domo, sxi povas vivi vintre cxar la flughaveno pagis por novaj fenestroj sed sxi ne povas malfermi ilin... Post la longigo de la aviadkurejo, la vivo en tiu urbeto tute ne plu estos vivebla. En ND des Landes la aviadiloj gxenus nur dekon da personoj (super la kurejo projektita estis nur unu aux du farbienoj) sed en la aktuala flughaveno deko da miloj... Sed la Zadistoj kaj Verduloj preferis herbon ol homoj.

-La projekto de ND des Landes estis pensita por malmulte influi sur la naturo, cxar per kontrakto la detruo devis esti kompensita. Kontrauxe, la pligrandigo de la aktuala flughaveno detruos parton de zono Natura 2000 kaj perturbos ne nur homoj sed ankaux sovagxajn birdojn, kiuj migras en la lago de Grandlieue.
de Josette (Bretonio-Francio)

==

2018-01-13 Japanio poluadas la maron per radioaktiva tricicio.

Regule la atomcentraloj rajtas ellasi akvon kiu enhavas tricicio (T – la radioaktiva izotopo de hidrogeno) en la maron. Kondiche ke ghi enhavas malpli ol 60.000 Bq/l (bekereloj po litro); do, jare estas en Japanio 60.000.000.000 Bq T. (1 Bq = 1 malintegriĝo (diserigĝo ?) en 1 sekundo).

En Fukushima intertempe amasighis akvo en tiom gigantaj kvantoj (1.000.000 tunoj), ke la spaco baldau ne plu sufichas. Pro tio la registaro volas permesi la ellason de tiu akvo – purigita iomete, sed praktike ne eblas elmeti la tricicion. Lau la nacia instituto NRA tiuj akvoj enhavas tricicion en kvanto kiu kauzas 1 – 5 milionoj Bq.

Tricicio de ekstere ne estas tre danghera, char ites Beta-radiado estas malforta, kaj ne trairas la hauton de homo.

Sed, se vi trinkas ghin au manghas fishon kiu daure englutis ghin vi povas riski enkorpiĝon de T, kiu povas kauzi problemojn se ghi estas enkonstruita en la DNA. Pro tio en Germanio estas limvaloro 100 Bq/l T en trinkakvo.

La duonigha tempo de T estas 12,3 jaroj – do, ghi radias sufiche longe por damaghi organojn.

La fishistoj kaj aliaj protestis, char ili ja ne povas vendi fishojn el tiuj regionoj.

Informo en la germana: <https://www.heise.de/tp/features/Fukushima-Mehr-als-eine-Million-Tonnen-mit-Tritium-belastetes-Wasser-soll-ins-Meer-abgeleitet-werden-3939632.html>

(dankon al Franz Alt por: Sonnenseite.de)

==

2017-11-13 Denova atentigo de Unio de Maltrankvilighitaj Scienculoj

Post 25 jaroj Union of Concerned Scientists alarmas (post la libro Global 2000 en la 70-aj jaroj), denove pri la detruemaj tendencaj kiujn kauzas la evolu de la homaro.

Temoj: klimato-vermigo, redukti la biodiversecon (je chiuj grandoj: balenoj - insektoj) , redukti kaj tratranĝi la praarbarojn kaj terenojn kie vivas sovaghaj bestoj, troa fishado, lavango da pesticidoj, troa altigho de la homonombro.

La teksto estas konciza, havas diagramojn kaj proponojn redukti la nomitajn minacojn.

Ili ne skribis pri la malbona influo de la militara sektoro, pri la oftaj mankoj en bona registrado, pro & pri korupcio.

http://scientistswarning.forestry.oregonstate.edu/sites/sw/files/Warning_article_with_supp_11-13-17.pdf

(dankon al Tali por la atentigo)